

Problemoj de sinkonscio en la romano "Mantiso" de John Fowles

SAVICHAEVA Olga

"Mantiso" estas la kvina el ses romanoj de John Fowles. Ĝi estas literaturscience malmulte analizita. Sed oni nomis kiel precipajn karakterizojn de la teksto parodion, sinparodion, ludon, spritan ŝercon.

Ni volus antaŭ ĉio atentigi la leganton pri la "serioza" plano de la romano, des pli, ke la verkisto en siaj kritikaj artikoloj kaj eseoj konstante insistas pri la graveco por li de verkprocezo, permesanta maksimume esprimi siajn ideojn kaj pensojn.

En "Mantiso" la aŭtoro ne strebas krei realan vivosituacion. La verko montras la pensadon de la verkisto, plenan de sinanalizo kaj duboj. Tia komplika interna procezo eblas nur, se la homo kapablas rigardi sin mem "el ekstere", pritaksi siajn agojn kaj iliajn rezultojn. En la teksto aperas iu *Miles Green*, – *alter ego* de la verkisto John Fowles. La romano havas "rondan" strukturon, kaj krome evidentas, ke la lastaj vortoj ne metas lastan punkton en la historio de la verkisto, lia interna evoluo ne havas limon.

En la romano li priskribas nur unu etapon de revizio kaj pritakso per la protagonisto de sia propra "mi". Nur en la komenco de la kvara parto de la romano evidentiĝas, ke la verkisto kaj la Muzo verkas romanon pri siaj interrilatoj, en la lasta ĉapitro ili kreas la tridekan varianton de sia historio. Tiamaniere, en la unuaj partoj estas unuaj variantoj de tiu historio (kiom da ili aperos ankoraŭ?)

La romano komenciĝas per malsupreniro de la protagonisto de Empireo al Limbo. Tiaj literaturaj koordinatoj asociiĝas kun la "Dia komedio" de Danto. En ambaŭ verkoj la personoj evoluas, kaj la stimulo de ilia evoluo estas rompo de kutima vivoritmo: perdo de la vojo, densa arbaro – katastrofo, halto en la energiprovizo. Kaj Danto

kaj *Miles Green* ofte senkonsciigās – pro surprizo, troaj emocioj, doloro: tio estas motivo montri la transiron de herooj al iu nova nivelo de sinkonscio kaj konscio de la mondo (en "Mantiso" la protagonisto svenas en la fino de ĉiu parto de la romano).

En la romano de John Fowles – same kiel en la verko de la fama florencano – la priskribataj eventoj koincidas kun la momento, kiam la romano estas kreata. Tio permesas pli profunde montri la sentojn de la heroo kaj tiamaniere proksimigi la verkojn al lirika teksto. Due, tiamaniere la verkisto prenas la rolon de Demiurgo: el multaj agoj, eventoj, aĵoj li elektas pere de vortoj la plej gravajn kaj signifoplenajn; pere de sia verko li organizas ilin en unusola tuto.

Tra la tuta verko, kiel ĉefmotivo, trairas la tranombrado de la literoj de la greka alfabeto. Ju. S. Stepanov analizante la konceptojn de Skribado, Alfabeto, Mondo kaj Vorto skribas, ke la alfabeto "povas aperi kiel modelo de la mondo", modelo de iu "makrokosmo", pro tio "la plej signifoplenaj, sakralaj punktoj de la alfabeto estas ĝiaj komenco, mezo kaj fino, kaj la signoj, kiuj troviĝas ene, ekhavas apartan sakralan interpreton".⁽¹⁾

En la "Dia komedio" same kiel en "Mantiso" la ilo, kiu organizas la tekston, estas ne nur Vorto, sed same Nombro. Komence de la romano la protagonisto ne memoras, kiu li estas, kian nomon li havas, ĉu li havas edzinon, sed li respondas sen pripensi al la demando de kuracisto pri la aŭtoro de "Notoj de Pikvik-klubo" ("*The Posthumous Papers of the Pickwick Club*" de Dickens) kaj aŭtomate solvas aritmetikajn problemojn.

La scio de Vorto kaj Nombro ĉiam akompanas la homon, same kiel la sento de Dio, timo, deziro. Ne estas hazardo, ke Pitagoro opiniis la Nombrojn kiel komencon de ĉio, kiel bazon de la kosmo. Ĝi estas same grava ilo de la mondpercepto kaj de la sinkompreno por la protagonisto, kiel la Vorto.

Ni scias, ke en la Antikva Grekio la ciferoj estis skribataj per literoj de la alfabeto. Tiamaniere, ofte aperantaj en la romano "*alfa, beta, gamma, delta... omega*" povas esti konsiderataj ne nur kiel provo "nomi" la mondon, sed ankaŭ provoj "kalkuli" ĝin. En "Mantiso" la plej oftaj – kaj sekve la plej signifoplenaj – estas la nombroj 9, 10 kaj 24. La cifero naŭ estas rekta indiko pri Danto kaj pri naŭ grekaj muzoj. La nombro dek resendas nin al Pitagoro, kiu opiniis ĝin ideala

kaj bazis sur ĝi siajn studojn pri harmonio de sferoj. Dudek kvar estas la nombro de literoj en la greka alfabeto; la nombro, indikanta plenan ciklon de iuj agoj, ĝian komencon kaj finon. La titolo mem de la romano diras, ke necesas inkludigi en ĝi ankaŭ matison-parton de Nombro, kiu paradoksece kunigas en si la signifon de eteco kaj de senfineco.

En "Mantiso" aperas nomoj de famaj verkistoj kaj pensuloj kiel Sapfo, Platono, Vergilio, Ovidio, Horacio, Katulo, Ŝekspiro, Aristofano, T.-S. Elioto (*Thomas Steams Eliot*), Dekarto, Alkeo, Prusto (*Marcel Proust*), Malarmeo (*Stephane Mallarmé*), Verlano (*Paul Verlaine*) kaj multaj aliaj.

La protagonisto-verkisto komparas sin kun ili kaj, malsame de Danto en la unua cirklo de Infero, kiu sentis sin egala al Homero, li faras tute alian konkludon. Lia rolo en la kultura evoluo estas tute eta, li estas nur "mantiso" – "aldono de relative eta signifo" ("*an addition of comparatively small importance*") – tian difinon de la vorto proponas *John Fowles* en la notoj por sia verko.

"Mantiso" estas matematika termino: eta parteto, kiu signifas frakcion de decimala logaritmo. Komence ŝajnas, ke mantiso estas parteto, kiun eblas neglekti. Sed fakte ĝuste ĝi precizigas kaj formas la karakterizon (plenan parton de logaritmo); la procezo de kalkulado de mantiso estas senfina (por matematikaj operacioj sufiĉas trovi kvin signojn de decimala frakcio), ĝi estas ĉiam proksimumeca. Mantiso estas ŝanĝebla, movebla parto apud neŝanĝebla entjera nombro.

La gvidanto de *Miles Green* en la spacon de kulturo estas Muzo. Ŝi havas multajn nomojn, ŝi estas vivanta atestantino de eventoj, kiuj okazis de nememoreblaj tempoj ĝis la nuno, ŝi estas inspir-antino de pentristoj, poetoj, verkistoj, muzikistoj. En ŝi ni povas vidi iajn trajtojn de *Beatrice*: la verkisto rigardas en la okulojn de la Muzo kaj tiamaniere li vojaĝas tra la tempo, historio, kulturo. Ekvidi kaj ekkoni nekonatan mondon (aŭ, pli precize, konatan laŭ libroj, historiaj verkoj, sistemigitan kaj komentitan pere de aliaj) la protagonisto povas nur per la okuloj de inicita persono.

La kontakto kun Muzo elvokas ĉe li diversajn sentojn: de doloraj, turmentecaj ĝis erotikaj. Ŝi ofte kontraŭas lin, menciante sian grandan sperton, enmiksiĝas en la verkprocezon, sekve de tio la protagonisto malkontente komparas sin kun skribmaŝino.

La Muzo aperas antaŭ la protagonisto-verkisto en sia vera aspekto. Ŝi estas *Erata*, protektantino de ampoezio, kaj ŝi kontraŭas la deziron de *Miles Green*, kiu volus vidi ŝiajn aliajn vizaĝojn. En la persono de Muzo *John Fowles* kunigis trajtojn kaj funkciojn de ĉiuj naŭ diecaj fratinoj; *Erata* konfesas, ke ŝi estas la aŭtoro de heroo poemo "Odi-seo", ke ŝi estas en plej bonaj kaj fidaj rilatoj kun *Talia*, kaj ke multaj komediaŭtoroj preferas ŝin al ŝia gaja fratino.

Ĉiuj artoj evoluas sub la protektado de amo. Ĉi tie *John Fowles* arte ilustras siajn ideojn pri la senlimaj eblecoj de romano. Ĝi estas libera formo, kapabla sintezi elementojn de diversaj artoj kaj literaturaj ĝenroj. Pensema heroo kaj la Muzo estas tradiciaj herooj de lirika arto.

La temo de "Mantiso" estas multnombraj dialogoj de personoj; en la romano estas minimumo da dekoraj (lito, vestpendigilo, seĝo, horloĝo), la sceneja spaco estas limigita; en la fino de la tria parto la aŭtoro uzas "teatron en teatro": "senvortaj spektantoj" rigardas amepizodon de la rolantoj; tio atestas pri la teatro de la teksto.

Tiamaniere *John Fowles*, konservante la komencan antikvan aspekton de la Muzo, parolas pri la neceso konstante reveni al siaj fontoj, al la plej antikvaj tempoj, kiam la mondo kreiĝis kaj organiziĝis pere de Vorto kaj Nombro, ĉar tiu reveno donos al ni magian forton de renoviĝo. De tiu vidpunkto la sceno de amo inter Muzo kaj Satiro ne estas hazarda: ĝi simbolas la kreaŭton de Apolona kaj Dioniza bazo.

Ni opinias, ke *John Fowles* en sia romano konceptas iujn ideojn pri la noosfero de Ŝardeno (*Pierre Teilhard de Chardin*). *Fowles* jam parolis en sia unua verko – filozofia traktato "Aristoso" ("*Aristos*") – pri konscia agado de la homo kaj pri ĝia signifo por la evoluo de la vivo sur la tero: la arto prezentas tiun ekstertempan mondon de supera intelekto (la noosfero de Ŝardeno), en kiu ĉiu fakto de arto estas moderna kaj senmorta... Ni eniras en la noosferon aŭ pere de kreado – kaj tiamaniere ni konfirmas la noosferon, aŭ pere de sentoj – kaj tiam ni ekzistas en ĝi ... Ĉar la travivado de arto estas – krom ĉio alia – la travivado de tiu fakto, ke aliaj homoj ekzistis same kiel ni, kaj ekzistas daŭre en sia verkaro" ⁽³⁾.

La franca sciencisto distingas la sekvajn ŝtupojn en la evoluo de la vivo: antaŭvivo – vivo – penso – supervivo. Dum la unuaj du etapoj kreiĝas biosfero, kiu evoluas laŭ leĝoj de "ortogenezo" (t.e. ekesto

laŭ perfekta modelo). La evoluo estas la apero kaj plikomplikiĝo de la konscio. La transiro al la tria etapo estas kaŭzata de la apero de pensemo, ĝi signifas la kapablon ne nur ekkoni sin mem, sed same ekkonscii sian ĉeeston kaj partoprenon en la ĉirkaŭa mondo; homa "mi" evoluas ne laŭ la vojo de individueco, sed strebas kuniĝi kun aliaj "mi".

Dum la lasta etapo okazas kuniĝo de homaj konscioj pere de amo (ĉi tie Ŝardeno referencas al Platono, lia kompreno de amo kiel rimeco por atingi la unuecon de sia personeco) en la plej supra momento de ĝia evoluo – punkto *Omega* – kiu, laŭ lia koncepto, estas Dio. La religieca pensulo vidas la universon evoluanta, havanta komencon kaj finon. En la romano "Mantiso" tiu procezo estas senfina. La protagonisto-verkisto travivas multajn metamorfozojn, strebante liberiĝi de la jugo de "fremda" parolo (Muzo) kaj konfirmi la sendependon kaj originalecon de sia krea konscio.

Notoj

(1) Vidu pri tio : *Fowles Jh. "I Write Therefore I am" // Evergreen Review, 1964, n°33 ;*

Fowles Jh. "Notes on Writing a Novel" // Harper's Magazine, 1968, vol; 237, n° 1418;

Fowles Jh. "On Writing a Novel" // The Cornhill Magazine, 1969, n° 1060;

Fowles Jh. "Is the Novel Dead?" // Books, 1970, n°1;

"An Interview with John Fowles" // Contemporary Literature, 1976, vol. 17, n° 4;

Baker J.R. "The art of fiction: An Interview with J. Fowles" // Paris Review, 1989, vol. 31, n°111.

(2) *Степанов Ю. С. « Константы. Словарь русской культуры ». М.: Академический проект, 2001, p.545.*

(3) *Fowles Jh. «The Aristos». London, 1980, pp.184-185.*

Adreso de la aŭtorino

S-ino SAVICHAJEVA Olga

str. 50 let Oktobria, d. 5, log. 11

450075, Ufa - 75 / RUSIO

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas profesorino kaj instruantino ĉe la katedro de la "Historio de okcidenta literaturo kaj arta kulturo" en la Ŝtata Universitato de Baŝkirio, Ufa, Rusio.

Scienca elio

Kalkbildo

En kelkaj regionoj en la suda Anglujo, la natura strukturo de la pejzaĝo ebligas pentradon de bildoj sur la herbokovritaj montodeklivoj. Pro tio la herbogrundo estas forigita – kaj tiel liberigita la suba kalkogrundo. Por daŭre videbliĝi la tiel faritajn „desegnaĵojn“, la kalkfunda grundo devas esti "kalkblanke" gratlavita kaj certe ankaŭ libertenata de herbosurkreskado. La plej bone konataj kalkdesegnaĵoj estas la "Blanka Ĉevalo" de *Uffington/Berkshire*, la giganto de *Cerne/Abbas* en *Dorset* kaj la "Longa Viro" en *Wellington/Sussex*. La Blankan Ĉevalon, 110 m longa kaj 40 m alta, oni povas "vidi" resp. ekkoni (t.e. percepti) nur el distanco de kelkaj kilometroj. La unuan fojon skribe menciita ĝi estis en la jaro 1100. Oni longatempe supozis, ke ĝi originis el la tempo de la naskiĝo de Kristo, sed laŭ lastatempaj taksadoj ĝi jam kreiĝis 500 ĝis 600 jarojn antaŭe. La Blanko Ĉevalo estas rigardata la plej antikva tribosigno de Britujo.

Tute alian historian fonon havas la *Cerne/Abbas*-giganto. Ĝi estas 55 m alta kaj ĉe la koksregiono 12 m larĝa. En la dekstra mano ĝi tenas 30 metrojn longan klabon kaj prezentiĝas 7,5 metrojn granda peniso erektiĝinta. La figuro estas rigardata petolaĵo el la 17-a jarcento. Kelkaj homoj opinias, ke temas pri karikaturo de la Lord-protektanto *Oliver Cromwell*. La plej miriga kalkobildo estas la "Longa Viro". La 70 metrojn alta figuro kun etenditaj brakoj tenas ambaŭflanke bastonon. Tio aspektas kvazaŭ viro staras en pordo-aperturo. La datado estas malfacila. Sed oni supozas, ke ĝi originas el prahistoria tempo. La plej miriga afero pri la penetradaj el herbo kaj kalkogrundo tamen estas ilia nura ekzisto. Ili ja fine estas tra miloj da jaroj de homoj konservitaj, kaj ĉiam denove kaj denove herboforigitaj cele al kalkblankbrila gratskrapaja bildo. (2007-08-03)

Abomeno militkaŭze

En malestimo pro la malkonsento de Francujo rilate la Irak-militon 2003, la usonanoj forstrekis sur siaj manĝokartoj ĉiujn indikojn pri franco. El *French Toast* (Franca toasto) fariĝis "*Liberty toast*" (libereca toasto). Antaŭe ankaŭ en Britujo du mondmilitoj, en kiuj la regno batalis kontraŭ Germanujon, zorgis por lingvopurigado. Hundoposedantoj ŝanĝis la Germanan Ŝafisthundon (germane: *Deutscher Schäferhund*, angle: *German Shepherd*) en pli neŭtralan "*Alsatian*", do "*Alzacanon*". Kaj se ĝis tiam britaj infanoj malsaniĝis pro morbiloj, nomata "*German measles*", oni nun celis, ke tiuj mikroorganismoj ne disvastiĝu – pro la noma epiteto – pli da timo. Ili fariĝis – la toasto salutas! – "liberecaj morbiloj" (*Liberty measles*). Aliflanke la usonanoj ĝis la hodiaŭa tempo ne vidas iun ajn kaŭzon rebapti la plej grandajn blatojn en la mondo, la tielnomatajn "*German cockroaches*". (2007-07-12)